revuo

esperanto

marto 1967
60-a jaro
n-ro 736 (3)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

ESPERANTO
revuo internacia

enhavo

37 Plialtigi la kvalifikojn de la Esperanto-instruistaro (Toczyski)

38 Japana partio devige instruigus Esperanton
Pliaj subskriboj por la Propono al UN

39 Ortografio kaj fonetiko en Esperanto (Duc-Goninaz)

40 Sugesto por AIDA-broŝuroj (letero)

41 Nekrologoj: Isbrucker, May, Bernfeld, Dust, Ravelich
Aŭtomata tradukado (letero)

42 Prof. Lapenna en Nederlando
Jubileo de estrarano de UEA
Lastmomente

43 CED: Esperanto en la lernejoj 1965/1966

44 Lerneja Bulteno n-ro 9

46 Recenzoj

47 Ricevitaj eldonaĵoj
52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967

48 La Juna Vivo

49 Mallonge

50 Oficiala informilo n-ro 399:
Laŭlanda membro-statistiko 1966

51 Ĉambro Simon Saft
Esperanto en radio

52 La poŝtmark-kolektado en 1966
La internaciaj konkursoj 1967

kovrila bildo

Merom: tomboj de rabeno Simeon bar Jahaj kaj aliaj saĝuloj en Galileo, Israelo (foto: NET)

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
marto 1967

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:
0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 77 landoj.

Estraro de U.E.A.:
Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

PLIALTIGI LA KVALIFIKOJN DE LA ESPERANTO-INSTRUISTARO



Józef Toczyski

En la numero 9/10 de "Norvega Esperantisto" de la pasinta jaro aperis interesa artikolo pri la internaciaj feriaj Esperanto-kursoj en Helsingør. Ili okazas dumsomere ĉiujare en loka internacia altlernejo. Interalie ni legas:

La altlernejo ĝis nun ne instruis Esperanton en siaj ordinaraj vintraj kursoj. La rektoro de la altlernejo en sia saluto al la kursanoj bedaŭris tion. Li asertis, ke la kaŭzo tute ne estis, ke li aŭ la estraro de la lernejo kontraŭagis Esperanton. La kaŭzo simple estis, ke ĝis nun ne estis eble trovi kompetentan instruiston.

Tiu ĉi lasta frazo vekis mian specialan atenton kaj, ŝajnas al mi, devas pensigi pri la afero ankaŭ ĉiun ageman esperantiston, kiu klopodas pri la aranĝo de esperantaj kursoj kaj kiu ĉiam spertas la konstantan mankon de taŭga persono por instruado. En la materialoj de la Unua Internacia Konferenco de la Lernejoj, en Kiuj Esperanto Estas Instruata ni trovas la esence gravan artikolon de d-ro Paul Neergaard sub la titolo "Kreado de Esperanto-Instruistaro: la Ŝlosilproblemo de Esperanto-Instruado".* Komprenante bonege la problemon, la aŭtoro de la artikolo jam en la enkonduko substrekas, ke "mankas iu firma bazo por la teknika efektivigado de la edukado mem pri tiu lingvo, mankas fiksita, normigita edukprogramo, mankas entute edukejoj kun oficiala instruado." Kaj li plue tute ĝuste konstatas, ke "sen tia edukado, organizita laŭ instruteknikaj, sciencaj principoj, ĉia pledado por enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn estos vana, nerealisma, kaj la strebado daŭros resti nur sporadaj provoj."

Feriaj kursoj por instruistoj

Por forŝovi de ni tiujn iom eble pesimismajn pensojn kaj por ne rezigni de iu ajn laboro sur la teritorio de lernejoj, ni devas elprofiti ĉiujn eblecojn, kiujn donas la ĝisnuna praktiko, kaj fariĝi nepre tre postulemaj rilate la kvalifikojn de Esperanto-instruistoj. La elementa kvalifiko estas, tute nature, bonega scio de Esperanto. Tio estas memkomprenebla, sed kiel ofte, bedaŭrinde, tute neglektata. Okazas ofte, ke aktivulo de Esperanta organizaĵo, kiu mem ne tro bone regas la lingvon, por instruado kvalifikas personon, kiu nur balbutas iomete Esperante kaj krom la bona volo aliajn kvalifikojn por instruado ne posedas. Certe estas tre ĝene seniluziigi tian kandidaton, tamen por la bono de Esperanto ĝi estas necesa. Kion do fari, por ne stari surloke sed nepre progresi? La respondecaj personoj pri Esperanto-instruado en kelkaj landoj suriris la ĝustan vojon, organizante feriajn kursojn por instruistoj, celantajn plialtigi iliajn kvalifikojn pri Esperanto-instruado. D-ro Neergaard en la supre citita artikolo tre precize kaj ĉiuflanke priparolas la problemon. Li skizas eĉ la specojn de diversaj kursoj por instruistoj, li montras la vojon, kiun oni devas nun iri por ne perdi la ŝancojn, kiujn donas la aktuala internacia situacio.

Ne estas eble por nia revuo represi ĉi tie la tutan artikolon de d-ro Neergaard, sed ni rekomendas al ĉiu, kiu nur interesiĝas pri la afero, nepre ĝin tralegi, kaj al ĉiu, kiu respondecas pri la Esperanto-instruado en sia urbo, regiono aŭ eĉ lando, ĝin bonege trastudi. Aparte zorgeme oni devas elekti la personojn, kiuj devas instrui en la altlernejoj, por ke ilia instruado baziĝu sur la vere scienca kaj ĝisfunda pretariĝo de lektoro. Sed la instruado ankaŭ ne povas stari je la sama loko. Aperas novaj ideoj pri la instruado de fremdaj lingvoj, naskiĝas novaj metodoj efikaj kaj interesaj, kiujn nepre oni devas trastudi kaj saĝe apliki.

Internacia unuecigo

Por unuecigi la preparadon de instruistoj en diversaj landoj al la instruado de Esperanto devas nepre serioze ekinteresiĝi la ILEI-estraro, same kiel ĝi nun komencis la laboron super la unuecigo de la ekzamen-regularo en diversaj landoj, pri kio ni skribas aparte. Sed ĉiu instruisto de la Lingvo Internacia unuavice devas mem plivastigi sian konon ne nur de Esperanto sed ankaŭ de lingvistikaj ĝeneralaj principoj, sur kiuj baziĝas ĉiu lingvo-kono. La Esperanto-movado bezonas nepre kompetentajn instruistojn, ĉar de ilia kompetenteco dependas la fina efiko de nia agado por la disvastigo de la lingvo.

---

* La referatoj de la 1-a Lerneja Konferenco (en Beograd, 1963) aperis presitaj en 116-paĝa kajero, 24 × 17 cm. Krom la studo de d-ro Neergaard troviĝas i.a. prelegoj de Vilho Setälä, Raif Markarian, Andreo Albault, Marcel Erbetta. La enhavo dividiĝas en 5 sekciojn: Kontribuo de Esperanto al ĝenerala eduko; Ĝisnunaj organizaj spertoj; Modernigo de Esperanto-instruado; Liberaj aktivecoj de Esperanto-lernantoj; Aktualaj organizaj problemoj. La kajero estas ankoraŭ mendebla ĉe s-ro R. H. M. Markarian, 2 Hazel Grove, Chorley, Lancs., Britujo, kaj kostas 10 ŝilingojn, 5 guldenojn aŭ egalvaloron.

JAPANA PARTIO DEVIGE INSTRUIGUS ESPERANTON

Kiel jam menciite en la februara "Esperanto", la Socialista Partio de Japanujo, kiu restas post la ĵusaj elektoj la plej forta opozicia partio en la japana parlamento, publikigis la 19-an de novembro 1966 dokumenton titolitan "Unua projekto de baza plano por reformo de la eduka sistemo". La projekto, kiun preparis la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo de SPJ, antaŭvidas devigan instruadon de Esperanto al ĉiuj infanoj en la aĝogrupo de 8 ĝis 12 jaroj.

Temas ankoraŭ nur pri projekto: la partia kongreso devos aprobi ĝin en decembro 1967. Kaj la Socialista Partio nuntempe ne formas la registaron. Tamen kiel oficiala projekto de grava politika partio la propono ricevis grandan publikan atenton.

Kiel motivojn por deviga instruado de Esperanto la dokumento mencias jenajn:

1) Esperanto helpas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj;

2) La partio celas la formadon de internacikonsciaj japanoj, kiuj, mastrante la gepatran lingvon, scipovos Esperanton kiel duan lingvon kaj ankoraŭ unu alian lingvon;

3) Per la ekzemplo, ke ĉiuj japanoj ellernas Esperanton, la partio deziras plenumi pioniran rolon por la disvastigo kaj de la ideo de monda paco kaj de komuna lingvo de la mondo.

Ne estas certe, kio fine decidigis la partion enprogramigi Esperanton, sed sendube al tio kontribuis la Jaro de Internacia Kunlaboro, la kampanjoj por la U.E.A.-Propono al UN kaj por la Peticio al la japana parlamento, la 50-a Universala Kongreso en Tokio kaj la ĝenerala publika interesiĝo rezultinta el tiuj.

Pluraj gazetoj en siaj komentoj pri la Projekto aparte reagis al la punkto pri instruado de Esperanto. El la tokiaj ĵurnaloj, "Jomiuri Ŝinbun" (preskaŭ 3 milionoj da ekz.) aplaŭdis: "Kia agrabla ideo instrui Esperanton al la junaj lernejanoj!" La ideo pri pionira ekzemplo de Japanujo plaĉis al "Mainiĉi Ŝinbun" (4,3 milionoj da ekz.): "Preskaŭ cent jarojn post la publikigo de Esperanto ĝi ankoraŭ ne estas adoptita kiel oficiala lingvo eĉ ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Se la projekto realiĝos, tiam la japana popolo fariĝos pioniro por la disvastigo de la mondlingvo."

Kiel dirite, la Projekto ankoraŭ bezonas aprobon de la partia kongreso. Tiucele povas helpi subtenaj leteroj el ĉiuj mondopartoj. Adreso: S-ro Gorô Jamanaka, Estro de la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo, La Socialista Partio, 1-1 Nagata-tyô, Tiyoda-ku, Tokio, Japanujo.

PLIAJ SUBSKRIBOJ POR LA PROPONO AL U.N.

Ĉar el la intertraktoj inter UEA kaj la Sekretariato de UN ankoraŭ ne vidiĝas, kian konkretan sekvon ricevos la Propono transdonita en oktobro, estas tre utile ankoraŭ kolektadi subskribojn (vidu en la decembra eldono, p. 197) por tiamaniere konservi la aktualecon de la afero, kiel ankaŭ, kompreneble, por doni plian pezon al la Propono mem.

Dum la pasinta monato la nombro de individuaj subskriboj plu kreskis, ĝis 925 449. Subskribis entute 3 849 organizaĵoj kun 72 944 000 anoj. La Centra Oficejo dissendis al petantoj kelkajn centojn da novaj subskrib-folioj.

Evidentiĝis, ke la listo de la plej viglaj kolektintoj, en la septembra "Esperanto" 1966 (p. 147), ne estis kompleta. Al la personoj, kiuj kolektis minimume 1000 individuajn subskribojn, aldoniĝas: en Aŭstrujo, Joh. Geroldinger; en Germanujo, Fritz Lowitzer, Heinrich Müller, József Kondor, Hermann Behrmann, Josef König, Emil Feist kaj Stefan Staub; en Nederlando, N. V. Kuiterman-v. Goor; kaj en Pollando, Helena Grabowska. Dankon kaj gratulon al ili ĉiuj !

Ni nun daŭrigas la liston de eminentaj individuaj subskribintoj, komencitan en la februara "Esperanto":

Prof. d-ro inĝ. Jan Filip, membro de la Prezidantaro kaj Direktoro de la Arĥeologia Inst. de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. Prof. d-ro inĝ. Theodor Ježdík, membro de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, Rektoro de la Ĉeĥa Teknika Altlernejo; d-rino M. Ludvíková, d-ro Miloš Helcl, d-ro Alexandr Stich, d-ro Jaroslav Kuská, Jiří Lípa kaj Ludék Urban, membroj de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj; prof. d-ro inĝ. Čestmír Štoll, membro-korespondanto de la Ĉeĥoslovaka Ak. de Sciencoj; Zoltán Kodály, akademiano, komponisto, Hungarujo; prof. d-ro Ivo Supek, akademiano, Prez. de la Ligo por Paco, membro de la grupo Pugwash, Jugoslavio; d-ro Jure Juras, Sekr. de la Inst. por Filozofio de la Scienco kaj Paco, Jugoslavia Akademio por Scienco kaj Arto; d-ro Fr. Tokarz, membro de la Pola Akademio de Sciencoj. Thor Heyerdahl, zoologo, gvidinto de la Ekspedicio "Kon-Tiki", Norvegujo; Alfred Gehri, dram-aŭtoro, Svislando. Natale Mosconi, Ĉef-Episkopo de Ferrara, Italujo; mons. Alfredo Bruniera, Ĉef-Episkopo de Montevideo, Urugvajo; d-ro S. K. Landersdorfer, Episkopo de Passau, Germanujo; mons. Franjo Kuharić, Help-Episkopo de Zagreb, Jugoslavio; Antonio Corso, Episkopo de Punta del Este, Urugvajo; Miguel Balaguer, Episkopo de Tacuarembó, Urugvajo.

En la aprila "Esperanto" ni listigos pliajn gravajn organizaĵojn, kiuj subskribis.

ORTOGRAFIO KAJ FONETIKO EN ESPERANTO

Michel Duc-Goninaz

La aŭtoro, prezidanto de Franca Esperanto-Instituto, diskutas kelkajn punktojn, en kiuj la skribaj signoj de Esperanto kaj ĝiaj parolaj sonoj diferencas aŭ povas diferenci unuj de la aliaj, kaj konsideras la estontan evoluon.

La vorto "ortografio" signifas samtempe: la maniero skribi korekte la vortojn de iu lingvo kaj: la skriba signaro, per kiu oni simbolas la sonojn de la koncerna lingvo. En la lingvoj, kiuj adoptis alfabetan (aŭ almenaŭ silaban) sistemon, la ortografio respondas al la fonetika sistemo de la lingvo.

Ŝajnas do, ke por esti plej racie kaj oportune lernebla kaj utiligebla, la ortografio devus fidele speguli la sonojn. Tiu fideleco fakte devas limiĝi al la *opozicioj* propraj de la koncerna lingvo. Ekzemple, en Esperanto ekzistas klara distingo inter la sonoj *s* kaj *z* aŭ *p* kaj *b* (meso/mezo, baro/paro), sed ne inter *é* kaj *è* (franclingve: mes/mais). La racia ortografio reprezentos do la funkcian fonetikon aŭ *fonologion*. Oni kutime diras, ke Esperanto respondas al la kriterioj de tiu racia ortografio. Tamen okazas konfliktoj inter ortografio kaj fonetiko eĉ en nia "logika" kaj "facila" lingvo.

Instruado kaj ekzercado

Kelkaj problemetoj povas solviĝi per taŭgaj instruado kaj ekzercado (malfacilo por ĉinoj kaj japanoj distingi *r* disde *l*, por parizanoj distingi *r* disde *ĥ*, k.s.).

Por la vokaloj, ni troviĝas antaŭ ŝajna paradokso: simpleco de la sistemo (Zamenhof konservis nur la plej distingeblajn vokalojn) kaj neprecizo de ilia korekta prononco (la Fundamento ne donas klarajn indikojn kaj la nacilingvaj partoj eĉ kontraŭdiras unu la alian). La aŭtoroj de la *Plena Gramatiko* registras ne malpli ol 12 diversajn vokalojn en la efektiva prononco de la lingvo, sed la reguloj, kiujn ili eltiras el siaj konstatoj certe ne havas universalan karakteron.

La ĉefa afero en la prononco de la vokaloj estas teni la mezan vojon, t.e. ne transpasi la "limon" de la teritorio de ĉiu vokalo. Ekz. ne estas danĝere elparoli *e* kiel *é* (nur malpli elegante), sed la danĝero montriĝas, se tiu *é* proksimiĝas al *i*, kiel ĉe hungaroj, ĉar tio povas detrui la opoziciojn de la lingvo (temo/timo, pezo/pizo k.s.). Sed ankaŭ ĉi tiuj problemoj estas solveblaj per la instruado.

La sistemo de la konsonantoj prezentas kelkajn mallogikaĵojn. Al *c* kaj *s* respondas logike la gingivaloj* *ĉ* kaj *ŝ*, sed al *z* respondas *ĵ* kaj al la digramo** *dz* (trovebla nur en kvar vortoj) respondas la sollitero *ĝ*. Tiuj falsaj interrespondoj ŝuldiĝas al influo de la okcidentaj lingvoj.

Sed la ĉefaj okazoj de konflikto inter ortografio kaj prononco en la praktiko estas la jenaj:

1) *Sonkonformiĝo*, t.e. ŝanĝo de sono depende de la ĉirkaŭantaj sonoj.

Ekzemple: *n* antaŭ *g* aŭ *k* tendencas velariĝi (lango, inko...). Tio tute ne gravas, ĉar en Esperanto tio ne kaŭzas miskomprenojn (vidu en *Lingvaj Respondoj*, 6-a eld. §71). Moliĝas *n* antaŭ *j* kaj fariĝas mola n (por kiu en Esperanto ne ekzistas speciala litero). Ankaŭ tio ne gravas. Antaŭ vokalo, *i* tendencas iĝi *ij* (mia, tio, kiu...). Tio estas jam pli grava, ĉar oni povus ortografii tiujn vortojn *mija, tijo, kiju* ktp tamen konforme al la Esperanta sistemo. Tio ne naskas miskomprenojn (ĉar la opozicio inter *io* kaj *ijo* ne ekzistas), sed tiu "natura" elparolo estas deflankiĝo de la perfekta kongrueco ortografio/fonetiko. Alie dirite, oni povas teorie en tiaj okazoj fari ortografiajn erarojn.

Pli grava eĉ estas la ebla konfuzo inter *i* neakcentita kaj *j* en la flua parolo. Distingi

Michel Duc-Goninaz prelegas al partoprenantoj de la Kultura Semajno en Grésillon, Francujo, en aprilo 1966. La ĉi-jara Kultura Semajno okazos de la 24-a ĝis la 31-a de marto.

jam de *iam* estas sufiĉe facile, sed en *jama* kaj *iama,* la diferenco tendencas malaperi. Komparu ankaŭ *mjelo* kaj *mielo.*

La klasikaj sonkonformiĝoj voĉa/senvoĉa (absoluta, elp.: aps.) kaj senvoĉa/voĉa (okdek, kverko, kvar, dek kvar, en kiuj *k* fariĝas *g* aŭ *v* fariĝas *f*) estas bone konataj. Kompreneble oni povas batali kontraŭ tiu ĉi tendenco, sed ĝi trudiĝas. La problemo estas ortografia, ĉar la prononco estas spontana kaj komprenebla (oni rekonas ĉe la aŭdo vorton, kies skriban formon oni jam konas). Sed homo, al kiu oni diktas tiujn vortojn, povas teorie erari, se li ne lernis antaŭe ilian ortografion. Tiu problemo, malgrava, dum Esperanto estas ĉefe uzata skribe de homoj, kiuj ĝin lernis per kursoj, certe evidentiĝos, kiam Esperanto fariĝos hereda lingvo.

2) Ekzistas ankaŭ *malfacilaj sonkombinoj,* kiel la duoblaj konsonantoj. Oni povas ilin elimini el la kunmetitaj vortoj (hufofero anst. huffero, litotuko anst. littuko . . .), sed ne el tiuj kun afiksoj (ekkuri), aŭ kiam okazas renkonto ĉe du vortoj (sed do, al la . . .). Aliaj malfacilaj sonkombinoj: sc (scienco), kc (sukceso), ksc (ekscii). Por elparoli ĉi tiujn vortojn, oni klopodas konformigi la prononcon kun la ortografio, tiel ke la vorto, jam konata en skriba formo, estas facile rekonata eĉ en neperfekta prononco. Sed kiam Esperanto fariĝos vaste uzata ĉiutaga lingvo, estas verŝajne, ke tiam la prononco malproksimiĝos de la ortografio. Por la koncernaj vortoj oni povas imagi solvojn kiel *aksepti, funksio, aksento* aŭ *acepti, funcio, acento.* La hispana donas al ni la ekzemplon de *ciencia,* pli simpla ol la Esperanta *scienco.* Esperanto ja havas la formon *esprimo* anstataŭ la etimologian *eksprimo.*

Eĉ en tre simplaj vortkombinoj, la litero *c* ne estas ĉiam oportuna, pro ĝia najbareco al *s. Senco* kaj *senso, intenca* kaj *intensa* povas facile konfuziĝi.

Strangaĵo en nia ortografia sistemo estas la transskribo de *x.* Kial do du literoj por tiu sono, kiam ekzistas nur unu por *ts* (c) aŭ *dĵ* (ĝ)? Zamenhof uzas jen *eks-* jen *ekz-* (antaŭ vokalo komence de vortoj, krom *makzelo* kaj *okzalo). Plena Gramatiko* diras, ke tio estas por eviti konfuzon kun la prefikso eks-, sed tiu konfuzo ja ekzistas en *ekskurso,* dum ĝi ne povus ekzisti en *eksisti* aŭ *eksemplo.* Fakte, tre ofte, la grupo *kz* estas prononcata *gz,* kaj la pola lingvo skribas tute logike: egzamin, egzemplarz k.s. Do, Zamenhof forigis la okcidentan x, sed aliflanke ne adoptis la racian solvon, kiun prezentas la pola lingvo.

Neperfekta sed oportuna

La ortografio de Esperanto estas perfekta nek el vidpunkto de la logiko de la simbolaro nek el fonetika vidpunkto. Tamen ĝi estas ĝenerale oportuna kaj regula. Ĝi prezentas kompromison inter la naciaj kutimoj de la okcidentaj lingvoj kaj la postuloj raciigaj de internacia lingvo.

Ĉu la prononco de Esperanto evoluos? Estas fakto, ke nuntempe ĝi evoluas al pli kaj pli granda unueco, kaj ke oni akceptas kiel modelon la prononcon, kiun plej spontane uzas la jugoslavoj, poloj kaj italoj. Plie, la instruado bremsas eblan evoluon. Sed, kiam Esperanto fariĝos ĉiutaga lingvo, estas verŝajne, ke tiam certaj malfacilaj sonkombinoj reduktiĝos aŭ maloportunaj sonoj malaperos (kiel nuntempe malaperas la sono ĥ).

Ĉu la ortografion oni povas reformi? Teorie ne, ĉar ĝi apartenas al la Fundamento, kaj reformo minacus rompi la unuecon de la lingvo; tiel klariĝas la malsukceso de ĉiuj ĝisnunaj proponoj de reformoj, kvankam Zamenhof mem skribis, ke la ortografio estas "nur demando de oportuneco de la skribado", kiu "la lingvon mem ne tuŝas".

Influi la evoluon

Kiel ni povas, sen atenco al la Fundamento, influi evoluon de la ortografio kaj prononco? Mi opinias, ke oni devus en la neologismoj ne uzi la neoportunajn sonojn: kc-, kv-, sc-. Se oni forlasus tiujn sonojn por la neologismoj, la vortoj, kiuj ilin enhavas, fariĝus iom post iom arkaismoj. Pro influo de la kutimo, oni bedaŭrinde alprenas ankoraŭ tiajn literkombinojn en novaj vortoj: ekscentra, ekscizi, scintili . . .

Ni konsciu, ke la sama fenomeno povas okazi en Esperanto kiel en la naciaj lingvoj: evoluo de la prononco, sed stagnado de la ortografio sub la influo de la konservemaj fortoj kaj sekve rompo inter ortografio kaj prononco.

(La supra artikolo estas bazita sur prelego farita dum la Kultura Semajno en Grezijono, aprilo 1966)

---

* gingivalo: gingiva sono (kp. palatalo, dentalo).

** digramo: du-elementa skribaĵo.

SUGESTO POR AIDA-BROŜUROJ

En la I-parto de la AIDA-broŝuro proponita de d-ro Albault ("Esperanto", feb.) eble tre celtrafa estus fragmento el tre sonriĉa Esperanta poemo, ekz. "Rankvarteto" de Baghy aŭ "Kongresa runo" aŭ "Iras abiturient' " de Kalocsay por konvinki la legantojn pri la literatura valoro de Esperanto. La belecon de tiaj poemoj oni ja povas konstati ankaŭ ne konante Esperanton. Mi mem uzis tiun rimedon en kelkaj prelegoj pri Esperanto kaj sukcesis konvinki miajn aŭskultantojn almenaŭ pri la beleco de tiuj poemoj.

Sed mi ne estas reklamospecialisto. Eble tiu rimedo taŭgas en broŝuro por intelektuloj, sed ne en iu por homoj malpli kleraj.

W. A. Verloren-van-Themaat
Amsterdam, 3 feb 67

INĜ. J. R. G. ISBRUCKER

Post longa malsano, en la aĝo de 77 jaroj, forpasis inĝ. J. R. G. Isbrucker, unu el la plej konataj esperantistoj de la dua generacio. Li ja apartenis al tiu generacio — se oni konsideras tiun de Zamenhof la unua — kiu donis al la movado aron da elstaraj personecoj sur diversaj kampoj, el kiuj forpasis jam pli frue homoj kiel Schoofs, Blaise kaj ankaŭ prof. Privat, kiu lasta estis dekomence granda amiko de la forpasinto.

Naskiĝinta en 1889 kaj lerninta Esperanton en 1909, s-ro Isbrucker partoprenis tiun saman jaron en Barcelono sian unuan Universalan Kongreson. De tiam li ĉeestis praktike ĉiujn Universalajn Kongresojn, kaj dum longa vico da jaroj li oficiale reprezentis en la Inaŭgura Solenaĵo la registaron de Nederlando.

Al la reekfloro de la movado post la angoroj de la unua mondmilito li donis, kune kun sia edzino, decidan puŝon, kiam ili havis la kuraĝon, en mondo kaj movado plenaj de necerteco kaj duboj, inviti la Universalan Kongreson al Hago en 1920 kaj prizorgi ĝian organizon. Tiu iniciato reestablis la tradicion de Universalaj Kongresoj, sen kiuj ne estus imagebla la Esperanto-movado en la nuna stadio de ĝia evoluo.

De tiam s-ro Isbrucker estis konata personeco en la internacia movado. Li partoprenis kiel komitatano la gvidadon de UEA, kies honora membro li estis ekde 1934. Laste li aperis en la plena lumo de la internacia movado en 1964, kiel prezidanto de LKK de la 49-a Universala Kongreso en Hago. Jam frue inĝ. Isbrucker estis membro de la Lingva Komitato, poste Akademio. En 1937 li sekvis Rollet de l' Isle kiel prezidanto kaj plenumis tiun funkcion ĝis 1963. Sub lia gvido aperis la Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro kaj studo "Pri la vortfarado en Esperanto".

La forpasinto estis aŭtoro de pluraj libroj. I.a. li verkis libron pri la historio de la Esperantomovado, poste reverkita en kunlaboro kun s-ro C. Støp-Bowitz kaj reeldonita en 1948. Ankaŭ sur literatura kampo li faris valoran laboron, precipe per siaj versaj tradukoj de "Gysbrecht van Aemstel" kaj "Josef en Dotan" de Vondel, la plej fama nederlanda poeto el la 17-a jarcento.

Profesie s-ro Isbrucker estis inĝeniero pri elektrotekniko. Ĝis sia pensiiĝo li estis vicdirektoro de la Supera Teknika Lernejo en Hago. Jam frue li specialiĝis pri la tiam ankoraŭ juna branĉo de malforta kurento. En Esperanto li verkis la libron "La Evoluo de la Telefonio". Li vekis interesiĝon pri la radio en prof. Privat kiu sekve de tio fondis Radion Ĝenevo kaj kunvokis en 1925 en tiu urbo internacian konferencon de radiostacioj, kiun inĝ. Isbrucker prezidis en Esperanto. En teknikesciencaj medioj en Nederlando li estis tre konata. Liaj lernolibroj, al kiuj li ĉiam aldonis resumon en Esperanto, estis kaj estas uzataj en ĉiuj teknikaj lernejoj. Reprezentanto de lia profesia medio je la kremacio akcentis, kiel karakteriza estas tiu aparta interesiĝo pri telekomunikado por li, kiu ĉiam serĉis la vojon al komunikado inter la homoj, kio ja estis la senco ankaŭ de lia esperantisteco.

Kiel homo inĝ. Isbrucker estis afabla, helpema kaj sprita personeco, fidela al siaj propraj opinioj kaj idealoj. Senbrua kaj senlaca laboranto, prefere en la studoĉambro. Kun scienca precizeco li dum jaroj preparis manuskripton de kompleta Esperanto-vortaro por la nederlanda lingvo. Bedaŭrinde li ne vidos ĝian aperon.

La kremacion ĉeestis granda nombro da personoj, inter kiuj reprezentantoj de la Esperanto-movado nacia kaj internacia, kiel ankaŭ de lia profesia medio. UEA estis reprezentita de la direktorino de la Centra Oficejo, f-ino M. H. Vermaas. Ĉiuj parolantoj en unu aŭ alia maniero priskribis lin kiel ekzaktulon kun flegma racio kaj varma koro kaj atestis pri lia granda signifo por la movado. UEA ĉiam memoros lin kun granda respekto.

Ivo Lapenna

Inĝ. J. R. G. Isbrucker

WALTER THOMAS MAY

Mortis en Trentham, Nov-Zelando, s-ro W. T. May, estrarano de NZEA, D kaj FD de UEA.

ERWIN GERHARD BERNFELD (1891-1966)

Mortis en Wellington, Nov-Zelando, s-ro E. G. Bernfeld, iama Ĉefdelegito de UEA por Aŭstrujo (1926-34).

LEWIS EDMUND DUST

La 17-an de decembro mortis en Hamilton, Nov-Zelando, s-ro L. E. Dust, iama prezidanto de NZEA, Ĉefdelegito de UEA de 1934 ĝis 1941, membro de UEA de post 1911.

MATEO JACK RAVELICH

Mortis la 3-an de decembro 1966 s-ro M. J. Ravelich, Stokes Valley, Nov-Zelando. Li estis pioniro kaj financa subtenanto de la novzelanda movado, membro de UEA dum 40 jaroj.

AŬTOMATA TRADUKADO

Ĉi tio ne estas plendo pri la kvalito de la interesega artikolo en la januara "Esperanto"; mi nur volas klarigi duban punkton sur p. 5: "angle parolantaj legantoj trovos, ke 'mustache' evidente estas eraro..."

Fakte, angla metalurgiisto tuj rekonas la esprimon "metal whiskers" (metalaj haroj aŭ fadenetoj), ĉar la teksto temas pri tiu ĉi fenomeno kaj ne pri sun-erupcioj. Tiu erareto nur substrekas la fakton, ke aŭtomata tradukado estu tre zorge kontrolata de spertulo en la fako, pri kiu temas la teksto!

Herbert K. Phelan
Bexley, Britujo, 20 jan 67

PROF. LAPENNA EN NEDERLANDO

En decembro 1966 la prezidanto de UEA faris mallongan prelegvojaĝon tra Nederlando. Sabaton la 17-an de decembro li parolis en Rotterdam pri "La transdono de la Propono al UN kaj ĝia signifo" en la aŭditorio de la nova koncertejo, okaze de la Zamenhof-vespero organizita de la Roterdama Esperanto-Komitato, kiu festis la fakton de sia 15-jara ekzistado. Ĉirkaŭ 150 personoj tute plenigis la ĉambron.

La parolanto ne nur priskribis la okazaĵon en New York, sed ankaŭ analizis la situacion kreitan de ĝi, la eblecojn kaj neeblecojn kaj la utilon de la transdonita propono por la tutmonda informado pri Esperanto. La publiko montris grandan entuziasmon kaj dankon. Ornamis la programon kantoj, muziko kaj deklamado de s-ino van Dalsem, f-ino Schoonman kaj d-ro Sadler, respektive. Entute estis altnivela aranĝo, pri kiu raportis ĉiuj roterdamaj ĵurnaloj.

La saman paroladon Prof. Lapenna faris la morgaŭan dimanĉon en Groningen, kie ĉeestis esperantistoj el la du nordaj provincoj de Nederlando. Ankaŭ tie plena ĉambro kun ĉ. 100 personoj. La Zamenhof-festo komenciĝis jam posttagmeze. Multaj ĉeestantoj aŭdis prof. Lapenna la unuan fojon. Varman aplaŭdon kaj dankon li rikoltis per siaj inspiraj vortoj kaj klara, kiel ĉiam bele formulita prezento de la faktoj. En la sama programo la vicprezidanto de UEA, s-ro E. L. M. Wensing, parolis pri modernaj metodoj de la informado pri Esperanto. Ankaŭ liaj vortoj ricevis varman akcepton, kaj certe ili donis sufiĉe da materialo por pripensado. Kantĥoro prizorgis la distran parton de tiu bela Zamenhof-aranĝo, kiun ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj kaj pri kiu raportis ĉiuj regionaj gazetoj.

La sekvintan lundon prof. Lapenna faris ankoraŭfoje la saman paroladon, nun en la nordholanda urbo Alkmaar, kie la ĉambron tute plenigis la esperantistoj de tiu regiono. Ankaŭ tie pluraj ĉeestantoj unuan fojon aŭdis la prezidanton de UEA kaj kun streĉa atento aŭskultis la viglan rakonton pri tiu okazaĵo en Usono, pri kiu la oficialaj raportoj en la Esperanto-gazetaro povis doni nur palan bildon. Dum la paŭzo okazis sufiĉe longa intervjuo, kaj ankaŭ en tiu regiono la gazetoj poste detale raportis.

Posttagmeze tiun saman tagon survoje inter Groningen kaj Alkmaar, dum halto en Leeuwarden, la ĉefurbo de la provinco Frislando, okazis gazetkonferenco en ĉeesto de la prezidanto de la "Frisa Akademio". Tiu instituto ĵus eldonis la verkon "Dorse kontraŭ la muro" en Esperanto-traduko el la frisa lingvo. Ĉeestis ankaŭ la aŭtoro de tiu libro, kiu temas pri la dummilita rezista movado en Frislando. La konferenco, kiun organizis s-ro S. Stuit, kaŭzis ampleksajn artikolojn en la frisa gazetaro kaj mallongan raporteton en la radio-elsendo por tiu norda regiono.

Ĉar tiu vizito de la prezidanto de UEA estis komenciĝinta sabatmatene per teknika konferenco kun kelkaj aliaj estraranoj, tiuj tri tagoj estis ja ege lacigaj, sed ankaŭ ege fruktodonaj, utilaj kaj inspiraj por granda nombro da esperantistoj en Nederlando.

GRAVA ATENTIGO

Prof I. Lapenna forestos el Britujo pro studvojaĝo de la 26-a de februaro ĝis la 10-a de aprilo. Laŭ ebleco bv. ne skribi al li dum tiu periodo. Se temas pri iu urĝa korespondaĵo, bv. ĝin adresi al la C.O. en Rotterdam, kiu ankaŭ dum la vojaĝo de la prezidanto estos kun li en daŭra kontakto.

ĈEF-GENERALO FRANCO — ALTA PROTEKTANTO DE LA 53-A

La Ĉefo de la Civila Domo de la Ŝtatestro de Hispanujo komunikis al la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, ke la Ŝtatestro, Lia Moŝto Ĉef-Generalo Francisco Franco-Bahamonde, akceptis la Altan Protektantecon de la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid en aŭgusto 1968.

LA INTERNACIA EKZAMENO

Pro la eksiĝo de f-ino Marjorie Boulton la Estraro de UEA unuanime elektis kiel sekretarion de la Internacia Ekzamena Komitato s-ron John C. Wells, esprimante al f-ino Boulton tutkoran dankon pro ŝia laboro.

JUBILEO DE ESTRARANO DE UEA

La 15-an de januaro 1967, en la kadro de la 60-jara jubileo de la Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", oni festis ankaŭ la 40-jaran prezidantecon de s-ro Maurice Jaumotte de tiu klubo kaj lian 50-jaran esperantistecon. Post festa kunsido, la urbestro de Antverpeno, persona amiko kaj iama lerneja kamarado de la jubileanto, akceptis la festantojn en la belega malnova urbodomo. Sekvis delikata jubilea bankedo en digna festoĉambro, kie granda nombro da tostantoj honoris la viglan kaj nelacigeblan prezidanton. La estraron de UEA reprezentis la direktorino de la Centra Oficejo, kiu memorigis, ke ne nur en sia loka kaj landa movado, sed ankaŭ en la internacia s-ro Jaumotte dum la kelkaj jaroj de sia estraraneco jam montris ŝajne neelĉerpeblan laboremon kaj entreprenemon.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,

Anglujo. Telefono (01) 904 9081

CED

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ 1965/1966

En la rubriko de CED de la septembra numero de "Esperanto", 1966, aperis la unua listo de lernejoj, en kiuj la Internacia Lingvo estis instruata en la lerneja jaro 1965/1966. S-ro O. Olsson el Lund, kiu entreprenis la enketon kiel komisiito de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj de CED, daŭrigis sian laboron kaj prezentis al CED kompletigan liston. Malgraŭ siaj klopodoj, li tamen ne povis ricevi informojn de ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en la menciita lerneja jaro. En sia akompana letero s-ro Olsson klarigis, ke, laŭ lia impreso, la statistiko pri kelkaj landoj, ekzemple pri Pollando kaj Jugoslavio, estas tre manka. Pri Jugoslavio s-ro Olsson skribis: "Nek en Ljubljana, nek en Zagreb, nek en Beograd kiu ajn volis preni sur sin la taskon eĉ sendi la adresojn de lernejoj aŭ instruistoj". Ankaŭ la statistiko pri Soveta Unio estas nekompleta, dum Grekujo, Kanado kaj Urugvajo tute mankas, malgraŭ liaj klopodoj.

Ĉiu, kiu iam faris seriozan enketon en kiu ajn sfero, bone scias, kiom da laboro estas necesa por atingi kontentigajn rezultojn. S-ro Olsson tre konscience kaj kun granda sindediĉo plenumis sian taskon, sed tamen la rezultoj ne estas tute kontentigaj, ĉar li ne ricevis la necesan helpon en kelkaj landoj. Tial bedaŭrinde la fina rezulto ne respegulas objektive la faktan staton, ĉar estas tute certe, ke la nombro de lernejoj, en kiuj la lingvo estis instruata, kaj sekve ankaŭ la nombro de gelernantoj, estas konsiderinde pli altaj. S-ro Olsson faros novan enketon por la lerneja jaro 1966/1967 kaj CED varme petas ĉiujn geinstruistojn, kiuj instruas Esperanton en la lernejoj, nepre respondi al la demandaro, kiun s-ro Olsson sendos post kelkaj tagoj. Li povos sendi la demandaron nur al tiuj lernejoj, kies adresojn li scias, ĉar ili respondis al la enketo por 1965/1966. La aliaj lernejoj estas insiste petataj komuniki al li sian adreson, por ke li povu tuj sendi la demandaron ankaŭ al ili. **Lia adreso estas: S-ro O. Olsson, Bantorget 3, Lund, Svedujo.**

Kvankam la statistiko estas manka kaj nekompleta, tamen, se iel eble, CED publikigos detalan trarigardon kun precizaj informoj pri la nomoj de lernejoj, gradoj, aĝoj de la gelernantoj, tipoj, nombro de gelernantoj, kondiĉoj de instruado k.a. Sube ni publikigas nur resumon laŭ la landoj pri la nombro de lernejoj kaj nombro de gelernantoj. La unua cifero indikas la nombron de lernejoj, en kiuj la lingvo estis instruata en 1965/1966, dum la dua cifero indikas la nombron de gelernantoj: Argentino 1 - 83; Aŭstralio 1 - 296; Aŭstrujo 3 - 31; Belgujo 6 - 183; Brazilo 2 - 232; Britujo 32 - 1573; Bulgarujo 85 - 4430; Ĉeĥoslovakujo 9 - 118; Danujo 4 - 60; Finnlando 7 - 150; Francujo 61 - 1454; Germanujo (Okc.) 10 - 105; Germanujo (Or.) 1 - 15; Hispanujo 2 - 63; Hungarujo 22 - 679; Israelo 1 - ?; Italujo 16 - 553; Japanujo 10 - 212; Jugoslavio 13 - 422; Nederlando 8 - 180; Norvegujo 1 - 20; Nov-Zelando 3 - 181; Pollando 56 - 3156; Soveta Unio 2 - 32; Svedujo 4 - 48; Svisujo 1 - 7; Usono 6 - 166.

Entute, do, en la lerneja jaro 1965/1966 Esperanto estis instruata en 367 lernejoj de 27 landoj al 14 449 gelernantoj. En la lerneja jaro 1962/1963 Esperanto estis instruata en 563 lernejoj de 32 landoj al 16 272 gelernantoj, dum en la lerneja jaro 1959/1960 la lingvo estis instruata en 356 lernejoj de 27 landoj al 13 137 gelernantoj.

Necesas ankoraŭfoje emfazi, ke la statistiko por 1965/1966 estas nepre nekompleta. En 1962/1963 la statistiko pri Jugoslavio montris, ke Esperanto estis instruata en tiu lando en 140 lernejoj al 3 021 gelernantoj. La statistiko por 1965/1966 indikas nur 13 lernejojn kun 422 gelernantoj. Estas apenaŭ imageble, ke en Jugoslavio la nombro de lernejoj malgrandiĝis de 140 al nuraj 13.

Kvankam manka, la statistiko estas tamen tre instrua el pluraj vidpunktoj. Ĝi ekzemple montras, ke Bulgarujo estas senkondiĉe sur la unua loko. Ĝi ankaŭ montras, ke en Britujo kaj Francujo — do en landoj, kies lingvoj ĝuas favoran pozicion en internaciaj rilatoj — Esperanto estas instruata en relative multaj lernejoj, precipe kompare kun la landoj, kies lingvoj ludas minimuman rolon ekster iliaj respektivaj limoj.

Donacoj por CED

	£	§	p
La stato je la 3-a de decembro 1966	119	5	7
S-ino J. W. Langtree, Britujo . . .		10	0
S-ro E. F. Dean, Britujo		5	0
S-ro R. Moerbeek, Nederlando . .		11	0
S-ro J. P. Jensen, Danlando		2	10
S-ro P. Hendriks, Nederlando . . .		1	0
S-ro Y. P. Kingma, Nederlando . .		1	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . .		10	5
S-ro N. Rytjkov, Britujo		2	0
La stato je la 31-a de decembro 1966	132	7	0

Donacoj por CED en 1967

	£	§	p
Gesinjoroj Kennedy, Britujo . . .	10	0	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8	0	0
S-ino R. Seddon, Britujo	2	0	0
F-ino Ann Kinghorn, Britujo . . .	5	0	0
La stato je la 31-a de januaro 1967	25	0	0

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.



red.: s-ro J. Toczyski

PROGRAMO DE INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Grandan helpon al instruistoj en ilia laboro faka dum la instruado povas kaj devas doni la unu-nura internacia organizaĵo de esperantistaj instruistoj, ILEI. Dum la Konferenco en Graz, kiun kun-organizis ILEI, okazis konferenco de tiu organizaĵo, kiu difinis konstantan programon de la Ligo, enhavantan jenajn principojn:

La Ligo celas registri la instruistojn esperantistajn laŭ la landoj kaj instigi unuopulojn fondi fakan asocion en sia lando. Ĝi devas ankaŭ noti la sintenon de la registaroj en diversaj landoj rilate al la instruado de Esperanto en la lernejoj kaj kompili koncernajn inform-dokumentojn, registrante ĉiujn atingaĵojn tiurilate, por ĝenerala utiligo.

La Ligo devas ankaŭ fari statistikon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, aktualigi kaj precizigi ĝin ĉiujare. Laŭ la instruplanoj kaj programoj de la Esperanto-instruado en diversaj landoj, la Ligo zorgos ellabori modelan principaron de instruado por internacia uzo, laŭ la aĝo de la gelernantoj kaj la speco de la lernejo. La Ligo devas ankaŭ sekvi la modernajn metodojn en la instruado de fremdaj lingvoj kaj tuj adapti ilin al la Esperanto-instruado, krome starigi principojn por modelaj internaciaj lernolibroj kaj legolibroj. Ĝi devas ankaŭ instigi diversspecajn lernejojn enkonduki Esperanton en siajn programojn, kaj zorgeme kompili kaj aperigadi la plej sukcesajn erojn de la lernejaj programoj en Esperanto por helpi diverslandajn geinstruistojn en ilia lerneja por-esperanta laboro.

Krom la supre cititaj principoj devigaj en la laboro de la Ligo, ekzistas ankaŭ multaj aliaj. Ni citis nur tiujn, kiuj evidente montras, ke ILEI suriris novan, ege ĝustan vojon kondukantan al la internaciigo kaj unuecigo de la Esperanto-instruado en la mondo kaj al preparo de kondiĉoj ebligantaj enkonduki devigan instruadon de Esperanto en la lernejoj.

INTERNACIA INSTITUTO DE PEDAGOGIO KAJ DIDAKTIKO

Dum la komitata kunsido de ILEI en Budapest estis fondita internacia instituto kun la supre citita titolo, kies direktoro estis elektita prof. Régulo-Pérez (La Laguna) kaj afergvidanta sekretario d-ro István Szerdahelyi (Budapest). La Instituto en tri sekcioj prilaboras konkretajn pedagogiajn taskojn. La unua tasko entreprenita de la Instituto estas unuecigo de la Esperantaj ekzamenoj. Kun la Instituto kunlaboras la sekretario de Aŭstria Esperanto-Instituto, Ernst Werner (Wien). La bazan regularon por unueca ekzamen-sistemo komplete prilaboris d-ro I. Szerdahelyi, kaj nun ĝi estas diskutata kaj prilaborata.

UEA ASOCIA MEMBRO DE FIOCES

La 27-an kaj 28-an de oktobro okazis en Madrido kongreso de FIOCES (Fédération internationale des organisations de correspondances et d'échanges scolaires — Internacia federacio de organizaĵoj por lernejaj koresspondado kaj interŝanĝoj), kiun partoprenis flanke de UEA kiel ĝia reprezentanto d-ro Jesús Liaño Pacheco, esploranto en la Instituto Arias Montano de la Supera Instituto de Sciencaj Esploroj. Laŭ komisio de KKL li prezentis dum la Kongreso la peton de KKL pri aliĝo de UEA kiel asocia membro de tiu utila kaj vere, laŭ ĝiaj celoj, tre parenca organizaĵo internacia. La peton de KKL rekomendis dum la kunsido du britaj partoprenantoj de la kongreso, ges-roj Flint, kiuj ankaŭ parolas Esperanton. Per balotado UEA estis unuanime akceptita kiel nova asocia membro de FIOCES. D-ro Liaño Pacheco dankis pro la unuanimeco de la decido kaj certigis la estraron pri certe interesa kunlaboro de la du asocioj por siaj komunaj celoj.

ĈU LA LEĜO-PROJEKTO 1816 ESTOS JESE VOĈDONITA EN LA ITALA PARLAMENTO?

La spertoj de niaj kolegoj en aliaj landoj certe estas por ni ege konsilaj kaj helpaj en nia agado en la propra. La ekzemplo, kiun donas la italaj instruistoj, agantaj manenmane kun aliaj esperantistoj en Italujo kaj en aliaj landoj, devas esti por ni instrua vojmontrilo. La devizo de la ĉefaj agantoj en tiu kampanjo, d-ro Dazzini kaj inĝ. Caraffa, estis: *se oni insistas, oni atingas la celon.* Kaj la celo vere jam estas tre proksima. Temas pri leĝoprojekto prezentita en la itala parlamento jam en 1964 (24-an de novembro), registrita sub la numero 1816 kaj celanta la liberan instruadon de Esperanto, apud sep naciaj lingvoj, en mezgradaj italaj lernejoj.

La agado komenciĝis tuj post la Beograda Konferenco kaj estis aranĝita laŭ jena plano:

1. elekti kelkajn deputitojn de diversaj partioj, kiuj estus pretaj prezenti la leĝoprojekton en la parlamento;

2. kolekti kiel eble plej multe da dokumentoj koncernantaj la devigan aŭ almenaŭ oficialan instruadon de Esperanto en diversaj landoj; pro tio oni kreis en Italujo specialan fakon: Internacia Servo por Esperanto-dokumentado, kies gvidanto estas inĝ. Caraffa;

3. prezenti la leĝoprojekton en la parlamento;

4. liveri diversvoje la plenan kolekton de dokumentoj al la Ministro de Edukado kaj al la vic-ministroj, kun aldono de specimenoj de plej bone eldonitaj Esperantaj revuoj, turismaj prospektoj, lernolibroj, broŝuroj kaj komercaj reklamiloj, akompanataj de informa letero;

5. disdoni similajn kolektojn al deputitoj kaj senatanoj;

6. pere de lokaj grupoj kontaktiĝi kun deputitoj, informante ilin pri la leĝoprojekto kaj petante pri skriba prezento de ilia starpunkto rilate la projekton;

7. per specialaj dokumentoj enhavantaj koncizajn informojn pri Esperanto liveri al ĉiuj pli altaj oficistoj de edukaj instancoj en Italujo kompetentajn sciigojn pri la Lingvo Internacia;

8. daŭrigi la liveradon de informdokumentoj, aktualigante de tempo al tempo la informojn;

9. konstante liveri la samajn informojn al la gazetaro, televido kaj radio.

Ĉiuj ĉi punktoj estis plenumitaj, la agado, kiu daŭris jam pli ol du jarojn, ne malfortiĝas, kaj la faktoj permesas esperi, ke la rezultoj estos bonvenaj. La plano kreita de niaj amikoj en Italujo estas bonega modelo de serioza agado por Esperanto, kaj, eĉ se la rezultoj konkretaj ne estus tro kontentigaj, tamen tiamaniere entreprenita laboro informas pri Esperanto kaj pri la problemo de lingvo internacia la plej kompetentajn personojn en la lando. Ni devas gratuli al la italoj kaj ripeti kun iliaj gvidantoj: se oni insistas, oni atingas la celon.

OKA KONFERENCO DE POLAJ INSTRUISTOJ EN VARSOVIO

Fariĝis jam kutimo, ke dum la vintraj lernejaj ferioj en Pollando esperantistaj instruistoj organizitaj en la Instruista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio aranĝas dutagan tutlandan konferencon. La 28-an kaj 29-an de decembro 1966 en Varsovio okazis la 8-a Tutpollanda Konferenco de Esperantistaj Instruistoj kun tre interesa kaj riĉa programo. Partoprenis ĝin 102 personoj el 40 lokoj en Pollando — nur profesiaj instruistoj aŭ profesiaj instruantoj de Esperanto. Granda parto el ili venis je la kostoj de lernejoj, en kiuj ili instruas la lingvon. La unuan tagon la ĉeestantoj aŭskultis prelegon de Tyburcjusz Tyblewski je la temo: "La motivoj de lernado de Esperanto". La duan tagon prelegis kolego A. Grela je la temo: "Instru-helpiloj en la instruado de Esperanto". Posttagmeze, la unuan tagon de la konferenco, laboris ĉiuj en komisionoj: laboro kun junularo, laborplano, regularo, kvalifikado de instruistoj. Oni aprobis novan regularon de la Sekcio, oni pridiskutis kaj aprobis la statuton de Esperantaj rondetoj porjunularaj en lernejoj, kaj oni elektis novan estraron de la Sekcio. Al la estraro eniris: gekolegoj Grela, Pettyn, Toczyski, Tyblewski, Wenclewski, Zapolska kaj Żytyński.

MALLONGAJ INFORMOJ

La Prezidanto de la Jerusalema Hebrea Universitato, s-ro Elijahu Ejlat, akceptis viziton de israelaj esperantistoj. Evidentiĝis, ke li mem estas esperantisto, kaj li promesis helpi al la Esperanto-movado en Israelo en ĝia penado enkonduki Esperanton en la lernejojn.

La Malgranda Praktiko. La redakcio de "La Praktiko" jam de unu jaro dediĉas unu paĝon en ĉiu numero por la legaĵoj de la plej junaj esperantistoj. Ĝenerale la enhavo de "La Praktiko" prezentas bonan legaĵon por ĉiuspecaj kursanoj kaj komencantoj. Bonege, ke la plej junaj lernantoj trovas en tiu gazeto ankaŭ ion interesan por si.

Pola Skoltaro kaj Esperanto. La nova listo de skoltaj "spertaĵoj" anoncita en januaro de la Pola Skolta Estraro enhavas ankaŭ la spertaĵon "esperantisto", kies insignon povas ricevi skolto-esperantisto, kiu scias la lingvon, korespondas kun kelkaj skoltoj eksterlandaj kaj partoprenas la Esperanto-movadon.

Studenta revuo instruas Esperanton. La studenta semajn-revuo "... i.t.d...." (kaj tiel plu), aperanta en Varsovio kaj tre populara en Pollando inter universitataj gestudentoj, de post la 8-a de decembro 1966 aperigas en ĉiu numero mallongan lecionon de Esperanto. Redaktas Andreo Pettyn, aŭtoro de la plej nova lernolibro de Esperanto en Pollando, unu el la redaktoroj de la Esperantaj elsendoj de Pola Radio.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ de UEA (asocia membro de FIOCES)

Ĝeneralaĵoj kaj rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Reprezentanto de ILEI: F-ino Jeanne Dedieu, 26 Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572.

Organizaj demandoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

Eksteraj kunlaborantoj:

Rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

Altgrada instruado: Prof. J. Régulo Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj.

Mezgrada instruado: D-ro M. Dazzini, Via Palestro 36, Massa (M.C.), Italujo.

Elementa instruado: S-ino R. Thorsen, Dyblandsvangen 7, Brønshøj, Danlando.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

PRI LA NOVA LIBRO DE KALOCSAY

Vojaĝo inter la tempoj, de K. Kalocsay. Eld. Stafeto, La Laguna, 1966. 197 p. 22 × 16 cm. 9,10 gld.*

Ne ĉiutage ni ricevas novan libron de nia plej granda literaturisto. "Vojaĝo inter la tempoj" estas gramatika studo de la aŭtoro de "Lingvo Stilo Formo" kaj kunaŭtoro de "Plena Gramatiko", kiu tamen, laŭ la vortoj de Gregor, "pli ol gramatikisto estas poeto": Kalocsay.

La temo? Ata/ita, laŭ la populara esprimo. Kaj per tio la libroj kaj broŝuroj pri tiu relative malgrava, kvankam longedaŭra lingva skismo, aperintaj de post 1960, jam ampleksas pli ol 1100 paĝojn. Ĉu oni ne preferu fosi sian itistan sulkon, verkante kaj eldonante librojn pri aliaj temoj? Ja ankaŭ la idistoj ankoraŭ persistas, sed jam delonge ni plene ignoras tiun dialekton.

Por tiu, al kiu sufiĉas scii, ke la atismo estas kontraŭfundamenta, necesas legi nur la ĉapitron XIII (pri la ekzemploj de la Ekzercaro). Por tiu, kiu ne bezonas tian konvinkon, troviĝas pli interesaj ideoj en aliaj ĉapitroj. Laŭ la aŭtoro mem, la verko "komenciĝis kiel pritrakto de la ATA/ITA-demando, kiel ties esploro el ĉiuj vidpunktoj. Sed montriĝis, ke la demandon oni povas elesplori nur sur larĝa bazo... Tiel do la verko pli kaj pli vastiĝis kaj fine fariĝis ekspliko de la tuta konjugacio, escepte la modojn." Legante ĝin, oni sentas tiun iom-post-ioman disvolviĝon. Oni rimarkas, kiel la aŭtoro ankoraŭ serĉadas definitivajn regulojn por la Esperanta verb-uzo. (Notu, ekzemple, ke Kalocsay jam korektas, sur p. 182, la 3-an eldonon de "Plena Gramatiko".) Oni komprenas, kial, laŭ Kalocsay mem, "la verko povus esti pli unueca, pli konciza, pli seversistema".

Ĉu tamen temas efektive pri "fakte scienca esplorvojaĝo", kiel anoncas la faldoklapo? Ne en la strikta senco, scienca. Nur parte la aŭtoro aplikas la sciencan procedon: kolekti vivajn ekzemplojn kaj el ili ekstrakti la teoriojn. Ne-science estas: troigi ("aŭtoroj.... hindaj", 13/14); citi el interparoloj (23/1); kompari formojn korektajn, sed ne ekskluzivajn (116/-9); el traduko konkludi ion pri la originala lingvo, kaj eĉ pri aliaj lingvoj parencaj al ĝi (119/-1.); aserti negativon sen ĝisfunda esploro (120/-11); konfuzi formojn kun funkcioj ("la transakto (T) estas homonima kun *estis -ita*", 118/-8); uzi neobjektivajn, afekciajn esprimojn ("senfantazia, plumpe pedanta kaj pezega" ..."agrable leĝeraj", p. 140). Tre mankas bibliografio.

Aparte interesa estas la kategoriigo de prezencoj sur p. 44, ekzemple la "deklara prezenco" (La tribunalo trovas la akuziton kulpa kaj kondamnas lin...) kaj la "prezenco de citado" (Platono skribas, ke...). La t.n. "historian prezencon" oni eble devus alinomi por ampleksi ankaŭ la prezencon de "samtempa" futbal-raporto (173/14).

Ŝajne restas iom da konfuzo pri la uzo de prezenco perfekta (estas -ita). "En la momento, kiam la skribitiĝado atingas la skribitecon, la letero *ist geschrieben* (estas skribita)" (118/1), sed ni poste legas, "ke tempopunkton oni ne povas esprimi per *estas,* ĉar la tempopunkto jam pasos, antaŭ ol ĝin oni eldirus" (131/-10).

Meritas ĉies atenton la sekcio pri "abstrakta imperfekto" (p. 85), nome pri la ebla uzo de ata en specialaj kazoj, ilustritaj per zamenhofaj ekzemploj. Unu tia kazo estas la uzo post modaj helpverboj (povas, devas, k.s.) aŭ post volitivo (u-formo): "Ĉi tiu ŝanĝo povas esti farata nur post la voĉdonado".

Tre instrua ĉapitro traktas pri "La verbotempoj en la subpropozicioj". Ĝuste ties reguloj estas tre ofte neglektataj: "Kaj Dio vidis, ke ĝi estas (ne: estis) bona". Ĉi tie Kalocsay plej malproksimen vojaĝas de la temo ata/ita, kaj liaj malkovroj valoris la penon.

Aplaŭdinde, Kalocsay rekonas la gravecon de semantiko: ĉu uzi ata aŭ ita, tio ofte dependas de la signifo, kiun oni donas al la radiko, ĉu momenta aŭ daŭra. "Oni povas diri laŭplaĉe: *permesita* aŭ *permesata; benita* aŭ *benata; karakterizita* aŭ *karakterizata*..." (87/16). La sama ĝenerala principo estas aplikebla al *ami* (91/16), *naski* (102/8), *vendi* (172/1) Tamen li mem falas en tiun kaptilon, volante pruvi, ke "*atingi* kaj la similaj perfektivaj momentverboj ne havas prezencan participon" (53/3) per la ekzemplo de ŝtalstango, kiu atingas ŝtaldiskon — kvazaŭ ĉiuj atingoj estus tiel netaj !

Solvoj kaj eliroj

Post ĉiuj diskutoj fine restas fakto, ke la formo "estis -ita" povas havi tri signifojn depende de la kunteksto: ago, antaŭtempeco kaj stato. Al iuj ne plaĉas tia homonimeco, kvankam neniel ĝi estas unika en Esperanto, kaj Kalocsay proponas uzi la verbon "stati" por distingi la trian signifon: "La ekspozicio hieraŭ statis malfermita". Dube, ĉu tio trovos imitantojn. Pli nature estus diri ekzemple: "La ekspozicio hieraŭ estis vizitebla".

Kvankam Kalocsay akceptas la eblecon ne uzi pasivajn formojn ("La pasivo estas tute evitebla", 67/-5), li komparas tion kun neuzo de la artikolo: permesebla, laŭ Zamenhof, por komencantoj. Sed la komparo estas falsa, ĉar neuzon de artikolo ĉiu rimarkas — neuzon de pasivo, neniu. Kabe rekomendis eviti kunmetitajn tempojn por akiri bonan stilon (129/6), kaj Kalocsay nomas nenecesan uzon de "estis -inta" — "rekte stil-eraro, pleonasmo". Ĉu do ne estas same stil-eraro, pleonasmo, diri "la malfacilo de la pasivo estas kaŭzata ĝuste de tiu manko" (82/-9) anstataŭ, multe pli simple, "la malfacilon de la pasivo kaŭzas ĝuste tiu manko" ?

V. Sadler (Rotterdam)

Fervoja terminareto germana-Esperanta, Esperanta-germana, de Gernot Ritterspach. Eld. Germana Esperanta Fervojista Asocio, Frankfurt, 1966. 80 p. 16 x 11 cm. 5,85 gld.*

Kun ĝojo ni salutas la Fervoja Terminaro-n eldonitan de la Germana Fervojista Asocio laŭ la decido de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La plaĉaspekta broŝureto havas pli ol 2000 terminojn plej urĝe bezonatajn el diversaj fervojaj subfakoj, kiuj estas ekstrakto el kelkjara laboro de la Terminara Komisiono. 90%-j de la terminoj estas ĉerpitaj kaj tradukitaj el la multlingvaj UIC-(Internacia Fervoj-Unio)-leksikonoj de 1957, 1965, kaj el kelkaj aliaj publikaĵoj fakaj.

Estas grandsignife, ke la manuskripton funde kaj perfekte reviziis, inter aliaj fakuloj, du spertaj kompetentuloj de ISAE. Ni deziras multe da sukceso al la laboro de la kompleta terminaro fervojfaka eldonota, kaj estos utile, se la landaj asocioj de IFEF intertempe eldonos similajn terminaretojn.

István Bácskai (Budapest)

Natura nutrado, de Ole Ramby. El la dana: Betty Larsen. Eld. SAT, Parizo, 1966. 14 p. 20 x 14 cm. 0,90 gld.*

Simpatia broŝureto pri la naturisma doktrino. Oni tamen dezirus ion pli alloge kaj konvinke prezentitan, ion malpli kaosan, kaj ion malpli asertantan: la aŭtoro volis tro diri en tro malmulte da paĝoj. Pro la stilo kaj vortelekto, mi ne komprenas la enmeton de la stampo de la "SAT-literatura Komitato".

A. Albault (Francujo)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Germana aldono al la internacia "Evangelia Himnaro". Eld. Oekumenische Liga e.V., D-287 Delmenhorst, Schützenhofstr. 4. 1966. 15 p. 15 x 10 cm.*

Komuniko de la 11-a plena sesio de la 8-a Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 14 p. 15 x 9 cm. 0,25 gld.*

Mia kondukiĝo al la kono de Dio, de Herman Hanhiniemi. Eld. E. Hanhiniemi, P.O.Box 764, Ingham, N.Q., Aŭstralio. 12 p. 25 x 19 cm., ofsetita. Senpaga.

Preĝo sub la verda standardo, de L. L. Zamenhof. Eld. Sipke Stuit, Arras, 1966. Faldfolia faksimilo de la originala manuskripto. 18 x 11 cm. 0,60 gld. (2,4 st.)*

La feliĉo kaj 6 aliaj kantoj, de Ramona van Dalsem. Eld. UEA, Rotterdam, 1967. Disko 33 r/m, 18 cm., fleksebla. 2,50 gld. (10 st.)*

Dorse kontraŭ la muro, de P. Wybenga. Div. trad. Eld. Frisa Akademio, Ljouwert, 1966. 164 p. 20 x 13 cm. Milittempaj rakontoj. Broŝ. 9,90 gld.; lede bind. 16,90 gld.*

Esperanto, de G. H. Benink. Eld. Stam, Nederlando. Tria preso, 1966. 160 p. 24 x 16 cm. Lernolibro por nederlandlingvanoj.

Cent himnoj, tr. Hans Amund Rosbach. Eld. la tradukinto, Norvegujo, 1966. 56 p. 21 x 15 cm., ilustr. 5,— gld.*

Kalendaro 1967. Fremdlingva Eldonejo, Pekino 12 p. 38 x 33 cm., kolorilustr.

Simplaj floroj, melodioj kaj tekstoj de Ramona van Dalsem. Eld. Dansk Esperanto Forlag, Åbyhöj, 1966. 24 p., 21 x 15 cm. 4,75 gld.*

Oni certe bonvenigos ĉi tiun verketon, ĉar ĝi alportas dek originalajn kantojn kun muziknotoj. Laŭ la trafa titolo, temas pri simplaj, plaĉaj kantoj, kiuj estos ŝatataj ĉefe de nia junularo. El poezia vidpunkto, estante iomete pli postulema, mi rimarkigas pri trouzo de adasismoj, kiuj tamen ne forprenas la ĉarmon kaj freŝecon de la kantoj.

A. Rink (Britujo)

52-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Ŝazar, Ŝtatprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 5

Vizo. La Ministerio pri Internaj Aferoj de Israelo informis, ke la partoprenantoj en la 52-a UK ricevos senpage la enirvizon por Israelo. La enirvizo estas petenda ĉe la israelaj diplomatiaj reprezentantoj en eksterlando ne pli frue, ol tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la Kongreso. Pliaj detaloj estos publikigitaj en la venontaj Oficialaj Komunikoj.

Dua Bulteno. Ekde la fino de februaro ĉiu aliĝinto ricevas la Oficialan Duan Bultenon. En ĝi troviĝas, krom ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, la mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo, ktp. La Loka Kongresa Komitato povas plenumi la mendojn de la kongresanoj, nur se tiuj estas faritaj pere de la mendiloj troviĝantaj en la Dua Bulteno.

Loĝado. Pro ĝia graveco ni deziras ankoraŭfoje atentigi la interesiĝantojn, ke LKK povos akcepti mendojn por loĝado **nur ĝis la 1-a de majo 1967.** Post tiu dato LKK ne plu povos certigi loĝadon. Personoj, kiuj intencas aliĝi al la Kongreso post tiu dato, devas tion nepre atenti kaj zorgi pri sia loĝado pere de vojaĝoficejo en sia lando.

Foto-konkurso. Ni atentigas, ke la konkursaĵoj por la Foto-konkurso ĉi-jara devas atingi antaŭ la 1-a de julio 1967 jenan adreson: 52-a UK, P.O. Box 1289, Tel Aviv, Israelo. La temo de la ĉi-jara Konkurso estas: "Moderna arĥitekturo (en ligo kun la Internacia Jaro de Turismo)".

Statistiko (je 13.2.67): Arg. 4, Aŭstral. 3, Aŭstr. 8, Belg. 15, Braz. 2, Brit. 38, Bulg. 30, Ĉeĥ. 17, Dan. 18, Finn. 3, Franc. 104, Germ. 16, Hisp. 10, Hongk. 1, Hung. 38, Isr. 81, Ital. 33, Jap. 4, Jug. 22, Kan. 3, Monako 5, Ned. 31, Norv. 6, NZ 1, Pol. 92, Portug. 2, Rum. 2, Sov. 3, Sved. 26, Svis. 9, Usono 25, Ven. 1. Entute (32 landoj) 655.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

KONTUROJ DE LA 23-a

LKK anoncis la provizoran programon de la – jam baldaŭ okazonta – 23-a Kongreso de TEJO. Ĝi ankaŭ insistis, ke ĉiu partoprenonto nepre ne forgesu decajn vestojn: por la akcepto de la urbestraro sed ankaŭ (kaj precipe) por la strando kaj la maro.
Krom tiuj du gravaj programeroj aliaj allogaĵoj estas arta vespero, teatra vespero kaj internacia vespero, krome tendarfajra vespero. Imagu tiujn vesperojn en varmeta aero kaj romantika krepusko...

Por aliaj kategorioj de kongresanoj estas antaŭviditaj kunsidoj de TEJO. Por scivolemuloj estas ekskursoj: unu en Natanja, unu laŭlonge de la marbordo (Kesario kaj Zikhron-Jaakov), unu al Galileo (Nazeret kaj aliaj lokoj). Vizito al kibuco kaj prelegoj pri tiu israela specialaĵo ne mankos. Sendube tiu programo jam konvinkis vin, ke viaj ĉi-jaraj ferioj estos en Natanja. Eĉ pli da surprizoj estas planataj, do anoncu vin ĉe: 23-a IJK de TEJO, p.k. 380, **Natanja.**

P.S.: Kaj ne forgesu vian bankostumon...

KARAVANO TRA TURKUJO

Pro specialaj avantaĝoj en Turkujo estas preparata plia karavano al Israelo. Ĝia forirpunkto estos Amsterdam, kie luita aviadilo fine de julio flugos al Istanbul. De tie luksa aŭtobuso veturos tra Turkujo kun kelkaj vizitoj al kulturaj trezorejoj. Post tri tagoj oni atingos Israelon.

La prezo de la vojaĝo estos relative malalta. Pliajn informojn petu de: Jonathan Pool, Room 377, International House, 1414 East 59-th Street, **Chicago,** Illinois 60637, Usono.

KIO ESTAS PROGRAMO PASPORTO?

"Programo pasporto" estas internacia interŝanĝo de personoj (individuoj kaj familioj) en la Esperanto-movado. Programo Pasporto celas helpi la restadon de eksterlandanoj ĉe familioj, tiel ke la gastoj pli intense ekkonos kaj eble ekŝatos la landon, ol estas eble por turisto. La Centra Oficejo, Bv. Oroño 866 "A", **Rosario,** Argentino (s-ro R. Feldman) interkontaktigas la gastojn kaj gastigontojn.

La gastigado estas senpaga dum ekz. semajno, monato aŭ eĉ jaro. Eblas, ke pluraj familioj rolu kiel gastiganto por unu gasto, tiel ke ĉiu gastigos nur dum mallonga tempo. La "Programo Pasporto" eniris la oficialan programon de TEJO, laŭ decido de ĝia Komitato.

Informojn petu de la respondeculo, s-ro Feldman.

SEMINARIO POR INSTRUONTOJ en la kursoj de la "Muelejoj de Metilernantoj" estas planata en la kadro de nacia renkontiĝo de la franca TEJO-sekcio, JEFO, en Grésillon, dum Pasko. La seminario, kiun partoprenu unuavice ĉiuj, kiuj pretas instrui Esperanton al la volontuloj de la "Muelejoj", pritraktos modernajn instrumetodojn taŭgajn por volontulaj kursoj, kaj spertojn el feriejoj ĝenerale kaj MdA aparte.

La tuta renkontiĝo de JEFO daŭros 5 tagojn, (samokaze kun la "Kultura Semajno" de U.F.E.), sed la seminario nur ampleksos parton el tiu periodo. La **aliĝkotizo** estas: 8 NF (+ 5 NF por ne-membroj de JEFO).

Restadprezoj en la tre komforta kastelo estas:

	aparta ĉambro	3-persona ĉambro	komuna ĉambro
De la 22-a vesp. ĝis la 27-a vesp.	100 NF	80 NF	65 NF
De la 23-a vesp. ĝis la 27-a vesp.	80 NF	64 NF	52 NF
Potaga prezo, se oni restas malpli ol tri tagoj	23 NF	20 NF	18 NF

Anoncu vin ĉe JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris 10.

FAMILIAĴOJ

Al Hilde kaj Stefan Maul ni kore gratulas pro la naskiĝo de Beate, unua filino.

La aktiva gvidanto de la Madagaskara TEJO-sekcio, Eugène Ravéloson, edziĝis. Niajn bondezirojn al li kaj lia edzino!

En granda nederlanda ĵurnalo aperis jena anonco:
"Nur nun ni eksciis pri la tragika morto de **Violina Stoiĉkova,** "Miss Esperanto 1964", kiu estis stevardino en la aviadilo pereinta 24.11.66 apud Bratislava.
Ni rememoros ŝin kiel bonan amikinon. LKK/IJK."

MINIATURAJ MESAĜOJ EL FRANCUJO

La gazeto "Le Courrier" (Valenciennes) publikigis tutpaĝan artikolon kun 5 fotoj pri la junaj esp.istoj kaj la loka klubo.

★

M. A. Tomialoje ekspoziciis en la urbodomo de Roeulx siajn 27 grandformatajn fotojn pri Grésillon.

★

Lastan someron, ĉe la Esperantista Kulturdomo en Grésillon, gejunuloj prezentis i.a. skeĉon de R. Schwartz kaj prelegon pri ĉeĥaj komponistoj.

★

Eksterlandaj kaj francaj gejunuloj estos kore bonvenaj ĉe la Esp.-tagoj en Calais, 13-15 majo 1967. (Rap.: L. Giloteaux)

★

La studenta Esp. grupo ĉe la Universitato de Aix-Marseille okazigis renkontiĝon je 21-22 jan. en Avignon. Estis 22 partoprenantoj el 5 landoj.

LAŬLANDE

Britujo

• La organizaĵo British Council, kiu interalie celas disvastigi la anglan lingvon, devos malvastigi sian agadon por ŝpari monon. Nuntempe ĝi ricevas £ 11 milionojn jare de la registaro.

Francujo

• Nova transportebla ekspozicio pri la Esperanta literaturo konsistas el 100 valoraj libroj alloge aranĝitaj en 12 kofretoj. Informas: Lentaigne, 3 av. de la Gaillarde, F-34-Montpellier.

Germanujo

• Studsemajnon por geinstruistoj, de 28 marto ĝis 4 aprilo 1967 en Rinteln (Weser) gvidos s-roj P. Kröger, H. Behrmann, W. Wingen kaj R. Haupenthal. Prelegos d-ro W. Bormann kaj rektoro Sonnabend. Eksterlandaj instruistoj estas bonvenaj. Detale informas: Heinrich Müller, D-3 Hannover, Mommsenstr. 5/I.

Hindujo

• Ekspozicion en la Publika Biblioteko de Delhio de 16 ĝis 19 decembro vizitis pli ol 1250 personoj, inter kiuj parlamentanoj, konataj urdulingvaj poetoj, universitatanoj k.a.

• Dua ekspozicio de Bengala Esperanto-Instituto (decembro 1966) enkadriĝis en jarfesto de la Universitato Ŝantiniketan kaj ricevis multe pli da vizitantoj, ol la unua (februaro). Multaj aŭdis unuafoje pri Esperanto.

Italujo

• Novan Esperanto-klubejon en Verona, kun malgranda startrinkejo kaj sufiĉe bona biblioteko, inaŭguris je 3.12.1966 la vic-urbestro k.a. aŭtoritatuloj. Prelegis prof. Carlo Minnaja de la Universitato de Padova.

Nederlando

• En la nederlanda esplorejo de Eŭratomo (Eŭropa Atomenergia Komunumo) fondiĝis Esperanto-societo. Naŭ membroj el tri landoj lernas en kurso, aliaj per diskoj. Adreso por korespondo: Esperanto-Kurso, p/a Eŭropa Lernejo, Zuervensweg, Bergen NH.

Pollando

• De oktobro 1966 funkcias lektorato de Esperanto en la Universitato Nikolao Kopernik en Toruń. Esperanto estas nedeviga studobjekto samranga kun la lingvoj hispana, itala kaj sveda. Dujara studado, unu horon semajne, finiĝas per komisia ekzameno, kiu rajtigas instrui Esperanton en lernejoj. La lektoro estas s-ro Andrzej Grzębowski. Studas 52 gekursanoj. En Pollando lektoratoj de Esperanto nun ekzistas ankaŭ en: Jagiellona Universitato kaj Pedagogia Altlernejo, Krakovo; Universitato en Łódź; Silezia Politekniko, Gliwice.

Usono

• Dum la tuta januaro okazis bele aranĝita ekspozicio de libroj kaj gazetoj en la biblioteko de la Universitato de Iowa. Ĵurnaloj raportis.

LAŬFAKE

Kino

• Internacia seminario pri "La pola nuntempa filmo" konsistos el filmprezentoj, prelegoj de famaj reĝisoroj kaj profesoroj, vizitoj al filmlaborejoj kaj konkursoj. Loko kaj adreso: Łódź, str. Lumumby 18/20 II D.S. Datoj: 23-26 aprilo 1967. Petante (senpagan) aliĝon, oni indiku siajn ligojn kun la filmarta fako.

Politiko

• La Sud-Vjetnama Nacia Liberiga Fronto komencis eldoni el Budapest bultenon "Informoj" en Esperanto pri la vjetnama milito. Adreso: Budapest XII., Eötvös utca 32, Hungarujo.

Religio

• KELI kaj IKUE, la organizaĵoj de evangeliaj kaj katolikaj kristanoj kunlaborantaj kun UEA, decidis aranĝi en 1968 komunan kongreson.

Televido

• "Danger Island" nomiĝas dramo montrata program-serie per la kanalo de Southern Independent Television, Britujo. Ĝi uzas Esperantajn tekstojn super butikoj k.s. por doni la aspekton de nekonata fremda lando.

Tradukado

• Laŭ sia buĝeto por 1967 la Tutmonda San-Organizaĵo (organo de UN) dungas tri pliajn tradukistojn. Malgraŭ tio, laŭ la buĝet-projekto por 1968, ĝi dungos ankoraŭ tri pliajn por tiu jaro.

Latvaj lernejanoj interŝanĝadas fotojn, leterojn kun Esperanto-parolistoj de Pola Radio.

LAŬLANDA MEMBRO-STATISTIKO 1966

Lando	AM	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	Kune
Albanujo	—	2	—	—	—	—	—	—	—	2
Alĝerio	—	—	3	—	1	—	—	—	—	4
Antiloj	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Argentino	300	—	30	—	11	—	—	1	2	344
Aŭstralio	130	29	95	4	19	—	—	2	3	282
Aŭstrujo	300	11	86	2	7	2	—	1	4	413
Belgujo	500	23	108	9	11	1	—	9	4	665
Bolivio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Brazilo	917	21	159	25	34	1	1	4	3	1165
Britujo	776	83	357	46	84	4	6	11	17	1384
Bulgarujo	4100	7	124	—	4	—	—	8	6	4249
Cejlono	—	—	2	—	2	—	—	—	—	4
Ĉeĥoslovakujo	—	2	177	—	8	1	—	3	2	193
Ĉilio	—	—	2	—	1	—	—	2	1	6
Ĉinujo	—	—	6	—	—	—	—	—	—	6
Danlando	805	30	127	20	9	—	1	6	1	999
Etiopujo	—	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Filipinoj	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Finnlando	—	68	173	15	13	1	5	8	6	289
Francujo	1357	84	454	22	65	6	9	12	17	2026
Gano	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Germanujo	1710	67	346	28	48	—	4	11	12	2226
Grekujo	116	—	16	—	—	—	—	—	—	132
Gvatemalo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Hindujo	—	1	13	—	—	—	1	—	1	16
Hispanujo	490	19	216	11	14	—	—	10	1	761
Honkongo	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Hungarujo	3110	2	97	—	—	3	1	4	1	3218
Indonezio	—	—	7	—	—	—	—	—	—	7
Irako	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Irano	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Irlando	—	—	6	—	2	—	—	1	1	10
Islando	—	—	19	1	3	—	—	—	—	23
Israelo	160	9	38	—	4	—	—	—	1	212
Italujo	1020	37	224	7	9	—	3	12	8	1320
Japanujo	1400	12	212	—	5	1	4	18	10	1662
Jugoslavio	1500	16	152	5	14	—	1	14	13	1715
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kanado	199	12	55	10	8	—	1	5	1	291
Kenjo	—	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Kipro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kolombio	—	—	3	—	—	—	—	1	1	5
Kongo (Dem. Resp.)	25	—	12	—	—	—	—	4	1	42
Koreujo	—	—	11	—	—	—	—	1	5	17
Kostariko	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Kubo	—	—	4	—	1	—	—	—	—	5
Kuvajto	—	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Libano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Liĥtenstejno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Luksemburgo	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	—	—	6	—	—	—	—	—	1	7
Makao	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Malio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Malto	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Maroko	—	—	1	—	2	—	—	—	—	3
Maŭritanio	—	1	—	1	—	—	—	—	—	2
Meksiko	—	1	9	—	3	—	—	—	2	15
Monako	43	1	5	—	—	—	—	—	—	49
Mongolujo	—	—	2	—	—	—	—	—	1	3
Mozambiko	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Nederlando	831	62	335	21	68	4	2	13	7	1343
Norvegujo	445	16	77	5	15	1	1	—	—	560
Nov-Zelando	195	29	72	6	25	—	1	4	1	333
Peruo	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1

Lando	AM	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	Kune
Pollando	3100	2	267	1	2	—	—	4	3	3379
Portoriko	—	—	—	—	—	—	—	2	—	2
Portugalujo	—	1	4	—	2	3	—	—	—	10
Rumanujo	—	1	30	—	—	—	1	—	2	34
Solomon-insuloj	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Senegalio	—	—	5	—	—	—	—	1	—	6
Soveta Unio	—	3	217	1	1	—	—	7	5	234
Sudafriko	—	1	15	3	7	—	—	—	1	27
Sudano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Svedujo	1000	129	327	83	38	1	5	1	7	1591
Svislando	110	92	98	8	44	1	—	7	3	363
Tanzanio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	2
Urugvajo	50	1	5	—	1	1	—	—	—	58
Usono	304	38	261	28	76	2	1	19	19	748
Venezuelo	—	1	11	—	—	—	—	—	—	12
80 landoj	24993	916	5102	363	668	33	48	206	175	32504

LA MEMBROSTATISTIKO 1966

Laŭ la membrostatistiko publikigita ĉi supre la jaro 1966 finiĝis per membraro de entute 32504. Ĉar la malgranda statistiko sur p. 32 de la februara numero montras nombron de 32067, tio signifas, ke post 31.12.66 alvenis ankoraŭ 437 kotizoj por 1966.

Se oni komparas la ciferojn kun tiuj de la antaŭa jaro, troveblaj en la marta numero de "Esperanto" 1966, oni konstatas kreskon de 662 asociaj kaj 251 individuaj membroj. Tio estas bela progreso, sed se oni konsideras la fortan apelacion al la tuta membraro, faritan en la decembra numero 1965, por varbado de unu plia milo da individuaj membroj, oni devas tamen kun bedaŭro konstati, ke la efiko de tiu alvoko restis tute sub la atendoj, ĉar apenaŭ kvarono de la celita nombro estas atingita. La intenco estis, per tiu plia milo solvi la financan problemon de la Asocio kaj eviti kotizaltigon. Malgraŭ kelkaj energiaj unuopuloj la membraro kiel tuto restis inerta, kaj, sekve, kotizaltigo montriĝis neevitebla.

Aliflanke, kun plezuro ni konstatas dum 1966 kreskon de la nombro de dumvivaj membroj per 92, certe dank' al la fakto, ke ĝis la fino de 1966 oni povis pagi DM-kotizon laŭ la malnova tarifo.

Ni ankoraŭ ne perdas la fidon je niaj membroj koncerne varbadon, kaj ni denove forte instigas ĉiujn varbi novajn individuajn membrojn. Ja kial devas resti 24993 esperantistoj, asociaj membroj, ekster la individua membraro de UEA, sen jarlibro, sen revuo Esperanto, sekve sen scio pri la okazaĵoj, progresoj, sukcesoj de la tutmonda movado! Ni scias, ke multe kulpas la severaj valutaj preskriboj en aro da landoj, sed restas granda nombro da aliaj landoj, sen transpagaj malfacilaĵoj, kie centoj da esperantistoj ankoraŭ ne estas individuaj membroj de UEA. En ligo kun tio ni tre petas ĉiujn relegi la artikoleton "Detaloj pri kotizoj" sur p. 195-196 de la decembra numero 1966 de "Esperanto" kaj agi laŭe, ne nur en Usono kaj Kanado, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj kun libera valuto. En tiuj landoj la slogano estu: "Ĉiu asocia membro ankaŭ individua membro de UEA!".

ĈAMBRO SIMON SAFT

Nova ĉambro dediĉita en la Domo de UEA!

Por honorigi malnovan membron de UEA, sinjoron Simon Saft, forpasintan en 1965, liaj amikoj aranĝis la dediĉon de tiu ĉambro je lia memoro. Ili kolektis inter si la bezonatan sumon de 5000,— gld. La afero estis en preparo jam proksimume unu jaron, sed pluraj formalaĵoj estis ankoraŭ plenumendaj. Nun ĉio estas aranĝita, kaj la ĉambro jam portas la nomon de tiu bedaŭrata membro, kiu dum multaj jaroj fidele subtenis la Asocion. Portreto lia ornamos la ĉambron, dum lia Esperanto-libraro trovos tie indan lokon. Varman dankon ni direktas en la nomo de la tuta Asocio al liaj amikoj, kiuj tiel respekteme prizorgis tiun dignan honorigon.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

RADIO ROMA. 5-III, Tra la literaturo; 12-III, Novaĵoj el Italujo; 19-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 26-III, Leterkesto; 2-IV, Sankta Francisko, poeto; 9-IV, Kasteloj de Latio; 16-IV, La fama tenoro Beniamino Gigli; 23-IV, Italaj belartaj urboj: Siracusa; 30-IV, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

BRITA RADIO daŭrigas siajn Esperanto-elsendojn la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato, per 49; 41 kaj 31 m. (5,99; 7,26; 9,77 megacikloj). Adreso: BBC (Esperanto), London.

RADIO PRAHA parolas en Esperanto dum la germanlingva programo ĉiumerkrede. Vidu la februaran numeron.

RADIO WIEN nun elsendas sian programon vendrede de 14.30 ĝis 14.40 per ondoj 203 m (1475 kcs), 25.46 m (11785 kcs).

RADIO PEKINO nun elsendas siajn programojn por Eŭropo (vendrede kaj sabate, 20.00 h. GMT) per la ondolongoj 45, 42, 39, 38 kaj 32 metroj. La elsendoj por Orienta kaj Sudorienta Azio restas senŝanĝaj.

LA POŜTMARKKOLEKTADO EN 1966

Iniciatante la kolektadon de poŝtmarkoj mi skribis, ke, same kiel dana pastro povis konstrui preĝejon per tia mono, ankaŭ ni povos konstrui kastelon al UEA. Jena statistiko tion pruvas.

En 1966 mi ricevis kontribuojn de 67 personoj el 22 landoj. "Esperanto" estas legata en 80 landoj de multaj miloj da personoj. La kolektado por 1966 donis la kutimajn mil guldenojn. Kalkulante ni povas konstati, ke, se ĉiu "farus sian devon", la kastelo jam estus fakto. La nombro de 67 kontribuintoj tamen ne estas fakta vero. La du kontribuintoj el Novzelando efektive reprezentas ĉiujn novzelandajn esperantistojn. Tial, se ĉiuj aliaj landoj prenus la ekzemplon de Novzelando, tiam la kastelo ne estus utopio. Ni kore dankas al sinjorinoj Rita Aagaard kaj Y. M. Canty, kiuj denove havas la unuan premion. Bonvolu transdoni nian dankon al ĉiuj novzelandaj kolektantoj.

La premiitoj estas:

1) S-ino Rita Aagaard, Auckland, Novzelando;
2) S-ino Y. M. Canty, Ponsonby, Novzelando;
3) D-ro Th. Thorsteinsson, Reykjavík, Islando;
4) S-ro F. Jelenc, Châtellerault, Francujo;
5) F-ino W. Addis, Flinders Park, Sudaŭstralio;
6) Oomoto, Japanujo.

Sendu daŭre al: Peter Zacho, Åmosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 31-a de januaro 1967

Konkurso I

		Lando	kvoto	poentoj	%
1.	(12)	Finnlando	3160	1790	56,65
2.		Usono	4526	2205	48,72
3.	(9)	Nederlando	5975	2810	47,03
4.		Britujo	6691	3020	45,14
5.	(10)	Danlando	3099	1360	43,89
6.	(8)	Svedujo	7180	2210	30,78
7.	(14)	Brazilo	3856	1165	30,21
8.	(6)	Francujo	7752	2251	29,04
9.	(1)	Hispanujo	3250	850	26,15
10.	(11)	Italujo	4220	860	20,37
11.	(15)	Jugoslavio	5375	1010	18,79
12.	(7)	Germanujo	7221	1165	16,13
13.	(3)	Japanujo	3965	395	9,96
14.	(13)	Svislando	2459	165	6,71
15.	(5)	Belgujo	2055	75	3,65

Konkurso II

1.		Kanado	1124	760	67,62
2.		Israelo	595	300	50,42
3.	(7)	Aŭstrujo	1475	615	41,69
4.	(9)	Islando	250	80	32,—
5.	(4)	Grekujo	270	80	29,63
6.	(3)	Sudafriko	260	65	25,—
7.	(8)	Norvegujo	1755	360	20,51
8.	(5)	Aŭstralio	1475	285	19,32
9.	(11)	Madagaskaro	250	47	18,80
10.		Argentino	905	100	11,05
11.	(6)	Nov-Zelando	1481	155	10,47

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

NOVAJ DELEGITOJ

Vidu la Jarlibron 1967/I, baldaŭ aperontan.

NE PLU VALIDAS (EN JARLIBRO 1966)

Britujo: Dockray: D.
Danlando. Randers: JD.
Francujo. Agen: D. Dax: D.
Germanujo. Bremen: D. Walsrode: D, JD & 2 FD.
Italujo. Meolo: JD. Napoli: D.
Nederlando. Assen: D. Rotterdam: VD (Brakel), FD (Elektrotekniko) & (Komerco).
Norvegujo. Bergen: FD (Montekskursoj), (Novnorvega lingvo) & (Studentaj aferoj).
Nov-Zelando. Trentham: D & FD.
Usono. Detroit: D & FD.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Becker, s-ro Günther, Blieskastel, Germanujo.
Bonvin, s-ro Luis Sebastian, Esperanza, Arg.
Burg, s-ro E., Den Haag 3, Nederlando.
Carlton, s-ro Gerald H., Sacramento, Usono.
Cook, s-ro Bernard M., Lakewood, Usono.
Cool, inĝ. G. F., Leiden, Nederlando.
Docal, s-ro Sergio R., Washington, Usono.
Dupuis, s-ro Roland, Stockholm, Svedujo.
Geus, s-ro S. de, Heiloo, Nederlando.
Grossman, f-ino Rochelle F., Elmhurst, Usono.
Hernandez Yzal, s-ro Luis M., Hispanujo.
Jungton, f-ino Emma M., Pewaukee, Usono.
Keizer, s-ro W. C., Haarlem, Nederlando.
Lieberman, d-ro E. James, Washington, Usono.
Mariano, d-ro M., Savigliano, Italujo.
Mariofilo, s-ro P. (C. Biedulski), Lublin, Pol.
Park, f-ino Zelma, San Diego, Usono.
Sandberg, s-ro Richard T., Pomona, Usono.
Scherer, s-ro Joseph R., Hollywood, Usono.
Shanks, s-ro William A., Richland, Usono.
Solin, s-ro Paul, San Diego, Calif., Usono.
Toscano, s-ino Martha E., Occidental, Usono.
Veronese in Marchiori, s-ino Dea, Verona, It.
Walker, s-ino Martha Ann, Napa, Calif., Usono.
Walsem-Schutte, s-ino A. M. E. v., Almelo, Ned.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

362 Hollnagel, d-ro inĝ. Wilhelm, Germanujo.
363 Calvert, s-ro Eugene, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

73 Grahovac, s-ro Ilja, Aŭstralio. 74 Dunbar, s-ro R.; 75 Lewin, s-ro M.; 76 Mallett, f-ino E. E., Britujo. 77 Kettunen, s-ro Otto; 78 Mikkola, s-ro Jalmari; 79 Narvala, s-ro N. G.; 80 Stoor, s-ino Brita; 81 Timonen, s-ro Esko; 82 Vilkki, s-ro Joel; 83 Vuolo, s-ro Lauri, Finnlando. 84 Bily, s-ro Harry; 85 Gründler, s-ro Martin; 86 Kaukal, s-ro W.; 87 Knauss, s-ro Wilhelm; 88 Wagner, s-ro Hermann, Germanujo. 89 Sgroi, s-ro rag. Rosario, Italujo. 90 Kocjančić, s-ro K., Jugoslavio. 91 Adelaar, f-ino L.; 92 Coppens-Bink, s-ino A. B. M.; 93 Laverman, f-ino A. A.; 94 Ponti, s-ro D., Nederlando. 95 Dickson, s-ino Margaret E., Sud-Afriko. 96 Farm, s-ro Thorsten; 97 Gustafsson, s-ro Karl E.; 98 Jensie, s-ino Märta; 99 Karlsson, s-ro Henrik; 100 Lindberg, s-ro Torsten; 101 Olsson, s-ro Einar; 102 Persson,

s-ro Gösta; 103 Sedendahl, civilingenjör B.; 104 Tell, s-ro Leander; 105 Turner, s-ro Fred, Svedujo. 106 Balcar, d-ro B. J.; 107 Belinfante, d-ro F. J.; 108 Milsted, s-ro H. B.; 109 Neri, s-ro Raymond R.; 110 Simon, s-ro W.; 111 Simpson, s-ro W. P., Usono.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

S-ro N.N., 400,—. Israelo: Ginz, s-ro Ota, 7,50. Nederlando: Jonker, f-ino M. T., 5,—; Moerbeek, s-ro R., 15,—; Smits, s-ro H., 25,—. Norvegujo: Utne, s-ro Nills, 7,50. Usono: Chobanoff, d-ro Stefan, 3,60; Darley, s-ro Louis B., 36,—; Murray, s-ro Jozefo, 24,33; Wills, s-ro R., 7,50.

FONDAJO CANUTO

Britujo: Rytjkov, s-ro N., 1 MA.
Italujo: Minnaja, s-ro L., 4 MA.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Britujo: Rytjkov, s-ro N., 15,— gld.
Italujo: Minnaja, s-ro L., 50,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Martinus-Instituto instigas al memstara kaj objektiva prijuĝo de la bazaj faktoj en la vivo. Ĝi ne celas al kredo, ĉar kredo ne estas utila en esplorado de faktoj. — Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danlando.

Kantojn kun muziknotoj, deklamaĵojn kaj ludojn por infanoj 7-15-jaraj, ĉu originale verkitajn en Esperanto ĉu tradukitajn, mi kolektas por baldaŭa eldono de "Koncerta Kajereto". Instruistoj kaj organizantoj de festetoj petas, pere de mi, la afablan helpon de ĉiuj; ĉu vi kuraĝas rifuzi?... Florence Côté, 1370 Frontenac, Québec 6, Kanado.

La Esperanta Societo de Heleninoj akceptas volonte vizitojn de eksterlandaj samideanoj en sia ejo: Sokratous 48, Athine.

Dudekkvinjara komputilprogramisto deziras korespondi kun sovetuniano pri kurantaj aferoj, matematiko, ekstera-spaca esploro. Weston Williams, 1658-A Lewalani Drive, Honolulu, Hawaii 96822, Usono.

19-jarulo dez. kor. kun samaĝa skandinavianino. René Wassenaar, Hoge Morsweg 103, Leiden, Nederlando.

S-ano Lajos Asztalos, Str. Cotita no. 2, Cluj, Rumanujo, deziras tre serioze korespondi pri geografiaj temoj. Kolektas geografiajn librojn, landkartojn (mapojn) kaj revuojn (eventuale poŝtkartojn). Interŝanĝe: povas sendi apud ĉi tiuj ankaŭ p.m. en kompletaj serioj.

Ĉu vi bezonas monon? Tiam kunludu en internacia ludo el Svedujo kun bonegaj gajneblecoj, neniakaze trompo. Informojn sendos Karl Waselowski, 6349 Sinn, Weserstrato, Germanujo.

La fifamaj ilustraĵoj de "Sekretaj Sonetoj" de Peneter nun estas aĉeteblaj en luksa represo en granda formato sur bela papero por enmeto en "Libro de Amo". Ĉiu posedanto de tiu libro nepre tuj uzu tiun unikan oferton. Prezo 10,— d.kr. aŭ 20 steloj afrankite nur kontraŭ antaŭpago al: T. Kehlet, Gl. Hellebaekvej 61 A, Helsingør, Danlando. Pĉk. 79558.

Ĉu vi scias la adreson de esperantisto nun loĝanta en unu el la jenaj landoj? Se jes, la Centra Oficejo de UEA petas vin bonvole sciigi al ĝi la adreson. Jen la landoj: Afganujo, Birmujo, Burundio, Centra Afrika Respubliko, Ĉado, Dahomeo, Dominika Respubliko, Ebura Bordo, Ekvadoro, Gabono, Gvineo, Haitio, Honduro, Jamaiko, Jemeno, Jordanio, Kamboĝo, Kongo (Brazzaville), Laoso, Liberio, Libio, Malajsio, Malaŭio, Maldivoj, Nepalujo, Nigerio, Nigero, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Paragvajo, Rŭando, Salvadoro, Saŭdi-Arabio, Sieraleono, Singapuro, Siria Araba Respubliko, Somalujo, Supra Volto, Tajlando, Togo, Trinidado kaj Tobago, Tunisio, Ugando. Antaŭdankon!

Anoj de Lions International, kiuj estas esperantistoj aŭ interesiĝas pri la Esperanto-movado, priskribu vian vidpunkton pri fondo de "Esperanto-Grupo de Leonoj" por interŝanĝi ideojn per leteroj aŭ seeble renkontiĝi en Universala Kongreso aŭ Internacia Kunveno de Leonoj. Ni deziras kontakti amikojn-"Leonojn". Skribu al s-ro Nils Gösta Narvala, Majavatie 14 A 7, Helsinki 80, aŭ John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, N.Y. 10314, Usono. Esperantistoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la Internacio de Leonoj bv. skribi por informoj.

Universala Skribo - Manuel Halvelik. Bazita sur latina alfabeto kaj fonetiko por unuece reformi la ortografion de ajna lingvo. 128 paĝojn, 30 stelojn. Vendata de UEA.

La Montreala Esperanto-Klubo urĝas ĉiujn skribi esperantlingve al "EXPO - 67", Montrealo, Kanado, petante informojn pri la Monda Ekspozicio. Tio subtenos niajn fortostreĉojn interesi aŭtoritatojn en la Esperanta lingvo.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

F-ino Yvonne Bonnefous pardonpetas siajn multajn tutmondajn gekamaradojn pro sia silento dum sia restado en Orano (Alĝerio) kaj ĉi tie sendas al ili siajn salutojn. F-34-Montpellier, rue Pelleterie 2.

Filatelistoj, kiuj sendos tri respondkuponojn al s-ro Flachsmeier, D-4005-Büderich, Neusserstr. 33, ricevos unutagkoverton special-afrankitan kun esperantlingva stampo DÜSSELDORF + ESPERANTO + FILATELO - 15.4.1967.

MONDANO

nova gazeto
dediĉita nur al

mondcivitaneco
kaj tiurilataj problemoj

aperos kvarfoje jare

Abono por unu jaro kostas 25 stelojn.
Pagante per nacivaluta mono vi rondigu al 10 svedaj kronoj aŭ 7 nederlandaj guldenoj k.t.p.

Pagu al s-ro Per Edler, Fack 4031, **UMEÅ** 4, Svedujo, kiu ankaŭ respondos al informpetantoj.

TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA, KIUN VI RICEVOS

ne paginte ankoraŭ vian kotizon por 1967 ! Zorgu, ke neniu numero mankos al vi. Se vi ankoraŭ ne kotizis por 1967,

PAGU TUJ !

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.-30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.-21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.



JEN VERKO NECESA POR NIA KONFUZA MONDO

DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ ESPERANTE) HONORE AL U. N. - ORGANIZO EN LA JARO DE INTERNACIA KUNLABORO

Enhavo universale valora: Interesega — Instrua — Eduka — Literatura — Agrabla — Poezia kaj tre ilustrita

Unuiĝintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamenhof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko — Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro (por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio Hispana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj, presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130 fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)